



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**  
**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA** ——— **DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS**  
 Administraĉo kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

R  
I  
Z  
K  
U  
L  
T  
U  
R  
O



E  
N  
A  
R  
A  
G  
O  
N  
O

De la plej antikva pratempo oni scias, ke tro salhavaj grundoj tute ne taŭgas por terkulturado.

Ilia salabundo tiom multe malhelpas la vivon de ĉiuj vegetaĵoj pro komplika serio da fiziologiaj fenomenoj, ke la grajnoj semitaj sur tiajn grundojn ne ĝermas, aŭ kreskas tre malbone, kaj plej ofte la vegetaĵoj produktitaj fine mortas, kaŭzante tempoperdon kaj malgajnon al la terkulturisto, kiu provis ekspluati tiajn terpecojn per terkulturo. Same okazas, kiam oni transplantas la kreskaĵojn en salan grundon, anstataŭ semi ilin.

Tamen estas vegetaĵoj, kiuj kapablas vivadi en salhavaj grundoj: ili estas la halacoj, tre diferencaj inter si laŭ botanika vidpunkto, sed havantaj la komunan econ rezisti, aŭ pli ĝuste dirate elporti, la venenadon kaŭzatan de kloridoj, sulfatoj kaj karbonatoj, kiuj jen solaj, jen laŭ tre variaj proporcioj, konsistigas la salojn malbonigantajn grundon.

Ĉi tiuj halacoj, tute neutilaj por la homo, escep-

tinte tre malmultajn specojn, konsistigas preskaŭ ĉiam la spontanecan kreskajaron de tiuj regionoj tiel malgaje impresantaj turistojn, kiuj ĉiam avidas belajn kaj gajigajn vidaĵojn. Tiu vegetaĵaro malprospera kaj malfacilaj cirkonstancoj, en kiuj ĝi vivadas, tiuj konfuzaj, grizverdaj nuancoj de ĝiaj folioj, ĝis kiam en aŭtuno ili rimarkeble ruĝiĝas, aspektigas tiom multe malgajiga la pejzaĝon de la regionoj, en kiuj ili abundas, sufiĉe tia eĉ sen ili pro sia grundkoloro kaj sia manko de arboj kaj homoj, ke ĝia rigardado aflikta la animon kaj lasas en tiun ĉi impreson pri dezerteco kaj senviveco tute neforgeseblan.

Kaj tamen tiaj terpecoj estas konkereblaj por terkulturado same, kiel oni konkeris aliajn similiajn en Ruslando, Aŭstrujo, Egiptujo, Hindujo, Usono k. t. p.

Tiucele la Terkultura Fako de la "Confederación Hidrográfica del Ebro" (Konfederacio por la kompleta akvoutiligo en la baseno de rivero Ebro)

nelonge post sia fondiĝo okupiĝis pri la tre grava problemo, kiamaniere igi praktike utilaj por terkulturado la tro salhavajn terpecojn ekzistantajn en kelkaj lokoj de la baseno.

Ĉar tiu ĉi problemo fariĝis pli kaj pli interesa por la lando, oni akcelis la fundamentajn studojn, kaj baldaŭ oni planis interesegan eksperimentadon limigitan, en la komenco, en la firmo "La Melusa", aĉetita tiucele de la Konfederacio.

*Daŭrigota.*

## LA SEVILJA CIGNO

*Al mia bona amikino Maria Pilar Tramullas Beltrán, kiel sincera memoro.*

«Griza ĉielo, ĉiam sama  
horizonto kaj marsi, marsi...»

Gustavo Adolfo Bécquer nomata "la Sevilia cigno" estis la poeto de la virinoj kaj de l'amo. Li naskiĝis en Sevilo, la belega urbo, kie ĉiam brilas suno. En Sevilo la poeto komencis revii ĉe la bordoj de rivero Guadalquiviro, aŭdante ĝian murmuradon kaj la mildajn ĝemojn de la vento kaj vidante la nesupereblan oron de ĝia suno...

Malriĉa kaj romantika li persekutis vane la iluzion de neebla amo; varma lampo, kiu lumigus la malluman solecon de lia koro ĉiam malgaja kaj ĉiam plena je senfinaj amemoj.

Li vivadis meze de indiferenta generacio. Li estis literatura vagulo, kiu suferadis pro terura nekompreno de la ceteruloj. Laŭ tiuj ĉi Gustavo estis neutila revemulo. Eĉ liaj amikoj foje ne komprenis lin. Kie estis dume la literatura gloro?

Li suferis ofte pro malsato, kiel preskaŭ ĉiuj poetoj kaj artistoj. Tio ĉi estas vero terura, vero, kiu hontigas..., sed eble pro tio ĉi mem ĝi estas vero. Ankoraŭ oni kredas, ke artistoj taŭgas por nenio, nur por revii, kaj ankoraŭ oni vidas multajn el ili vivadi silentan vivon, kiel ĉiu geniulo, atendante, ke iam eble plenumiĝos iliaj gloraj ambicioj.

En sia frua juneco jam Bécquer sciis, kio estas plori. Lia juna koro konis multajn ĉagrenojn kaj malagrablojn. Ĉiutage li lasis skribitajn sur la folioj de sia kajero delikatajn versojn temantajn pri doloroj kaj suferoj spertitaj en la tago. Liajn samtempulojn ne plaĉis la poezia literaturo. Kaj li skribas al amiko:

"Mia animo estas nur sensenta ĉifono; ĝi pezas sur min, kiel neutila ŝarĝaĵo, kiun fatalo metis sur miajn ŝultrojn, kaj kiu devigas min marsadi, kiel nova, vaganta judo".

Eble estis tiam, kiam li komprenis, ke antaŭ multaj jarcentoj certe venis en la mondon terura leĝo malindulge ordonanta, *dura lex, sed lex*, ke poetoj nur rajtas vivadi en la mirindaj mondoj kreitaj de sia fantaziema imagpovo dank' al ilia potenca inspiriĝemo.

En la mondo tamen ĉio ne estas sufero. Iun tagon Gustavo Adolfo atingas esti dungata, kiel redaktoro en grava revuo, en kiu la poeto publikigos siajn poeziojn kaj legendojn.

Li ekkonas trankvilan vivon. Li verkas, ne suferante korpe nek anime. Ĉu tiu ĉi sunradio estos longedaŭra en lia malluma vivo? Baldaŭ lia vivo mem parolos... Sed almenaŭ li sin konsideras relative feliĉa. Kio okazos poste? Kion estonto gar-

dos por li? Ĉe liaj lipoj ĵus aperis rideto plena je skeptiko.

... ..  
Iun tagon poezia ĝardeno estas milde kisata de printempa suno. Meze de ili romantika fontano murmuradas melodias kantojn, kvazaŭ eterna amo. Diantoj, narcisoj, loniceroj kaj violoj malfermas siajn buŝetojn, kvazaŭ ili ridus, dislasante dolĉajn kaj revigajn parfumojn. Nevideblaj merloj kaj najtingaloj kantadas ĉarme. Papilioj flirtas ĉe floroj kaj hirundoj petole flugadas... En tiu ĉi scenejo aperas juna homo. Li promenas maldiligente; lia maldika kaj gracikreska korpo, lia bela kaj interesa kapo kun longa kaj frizita hararo, kies bukloj karesas lian frunton plena je belaj idealoj, lia melankolia rigardo, lia pinte romantika barbo kaj eta liphararo aspektigas lin, kvazaŭ aristokrato de Van-Dick.

Laŭ sia kutimo li portas desegnan kajeron sub brako: li estas Gustavo Adolfo Bécquer. Antaŭ malmultaj tagoj li venis en la artan kaj silenteman urbon Toledo.

En ĉi tiu momento li rigardas ĉirkaŭen... Li trovas sin sola en la ĝardeno... Subite li ekaŭdas profundan sopirelspiron...

Estas tio laŭŝajne virina ploro. Jes jen sur benko sidanta knabino, kiu ploras, kaŝante permanesian vizaĝon. Milda venteto forblovis teren kelkajn paperfoliojn, sur kiuj estas vortoj manuskribitaj. Kaŝite post arbo, li prenas treme folion kaj legas jene:

"La tagiĝo estas ombro  
El via ridet'..."

... ..  
... ..

"Ho, kiel povas vivi tiu rozo  
Apud via kor'?"

Neniam vidis mi ĝis nun, ke vivas  
Sur vulkan' la flor' "

Ili estis de li verkitaj versoj, kiujn ŝi kopiis nedubeble el la revuoj, por kiuj li laboras.

Emocie li forlasas la paperon kaj rigardas la knabinon... Ho, ŝi estas tiu belulino, kiun li vidas ĉiutage, dum siaj romantikaj promenadoj, ĉe la balkono de sia hejmo; la virineto, kiu havas en sia rigardo promesojn kaj iluziojn. Kaj ŝi ploras! Ĉu eble pro neatingebla amo, kiel li ankaŭ?

Li pensas momente... Jes, ŝi komprenas lin..., ŝi komprenas liajn seniluziigojn... Pro tio mem ŝi ankaŭ suferas kaj sin kaŝas en ĝardenon. Li foriras malrapide, tre malrapide, dum liaj lipoj sopiras dolĉe, ame, pasie: "Belega virineto, kiel Madono eltirita el pentraĵo de Correggio... Mi amas vin!". Jes, kiam bonhavo kaj sorto ridetos al li, li oferdonos al ŝi ĉion, kaj tiam... ankaŭ ili povos atingi feliĉajn tagojn!

Kaj la poeto, la delikata Gustavo Adolfo, per naiva penso antaŭvidas paradizon.

Sed proksime, tre proksime al li la Morto tragedie serĉante ridas enigme.

JOSE GASCON CARRETER.

### NORDA GAZETO

*Teatraĵetojn, dialogojn, melodiojn* esperantigitajn interŝanĝe aŭ kontraŭ repago pruntepetas franca grupo. Sufiĉa adreso: *Esperanto*, DUNKERK (Francujo).

**GUSTAVO ADOLFO BECQUER**

Mi brunulino fajreca estas  
 Simbolo tipa de ampasi'  
 Avid' de ĝuoj min tute regas  
 Ĉu min vi serĉas?—Ne vin, ne vin  
 Mi blonda estas, orbukla, pala  
 Liveri povas feliĉon mi  
 Mi estas milda, sentema, dolĉa  
 Ĉu min vi vokas?—Neniel vin  
 Mi estas revo kaj neeblaĵo  
 Fantomo vana el lum', vapor'  
 Mi netuŝebla, senkorpa estas  
 Mi ne ampovas—Ho venu, ho!

El la hispana tradukis,  
 RAMON DE SALAS.

**LA NEFORIGEBLA MALFELIĈAĴO**

Sur la neĝkovrita strato mi renkontis mian bonegan amikon Henriko López, kiun mi amis kiel fraton. Ĝus vidinte lian tre malgajan vizaĝon, mi komprenis, ke li havas grandan, animan suferon. Mi estas sufiĉe sperta psikologo.

Mia amiko min brakpemis tuj kaj ekploris. La malseko de liaj larmoj sur mia surtuto certigis min pri mia supozo. Mi kore kaj delikate apartigis lin de mi, tiel por prizorgi mian surtuton, kiel por devigi lin rakonti siajn dolorojn.

Kaj per singultaj vortoj li rakontis al mi, ke li havis grandajn perdojn; mortis lia unika filo kaj granda monsumo malaperis en la bankroto de la Banko Bermúdez. La spiro eliranta kun ĉiu vorto el liaj pulmoj estis glacia pro la malvarmega vetero, kaj formis kvazaŭ fumon elĝantan el interna bruĵo.

Mi jam diris, ke mi multe amas mian bonegan amikon, kaj sekve mi kredis min devigata transdoni al li mian optimismon, sed bedaŭrinde miaj penoj por tiu celo ne sukcesis. Tial mi devis ankaŭ malĝojiĝi laŭ la ordonoj de la bonamikeco.

Preterpasis nin malalta kaj tro dika viro, kiu ŝajnis al mi marŝanta kruĉego enmetita en mallarĝa surtuto sub melonĉapelo sendube por aspekti pli alta.

Li rigardis nin kaj, ne atentante nian grandan suferon, daŭrigis indiferente sian vojon.

La homaro estas tiel. Ĝi ne interesigas pri la malfeliĉo de iu alia. En tiu momento mi konvinkiĝis pri la egoismo de la homaro...

Mi faris novan provon por kontentigi mian amikon, sed Henriko turnis al mi siajn okulojn plenajn de larmoj, kiuj kvazaŭigis ilin el malmultekosta vitro.

— Dankon, kara Jozefo — li diris per funebraj vortoj, kiuj ŝajnis elirantaj el poŝo de lia pantalone, — dankon pro via bona intenco, sed nenio forigos mian profundan malĝojon, mia animo estas pli glacia, ol la vetero.

La termometro de apuda apoteko montris sep gradojn sub nulo. Neĝero falis sur la nazpinton de mia amiko.

Du junaj kaj gajaj fraŭlinoj preterpasis nin. Ili estis tiel belaj, kiel preskaŭ ĉiuj Madridaninoj; iliaj haroj kiel ebono, iliaj ridetantaj kaj grandaj okuloj jetis tra siaj okulharoj, similtantaj plumajn ventumilojn, rigardojn, kiuj degeligos la glacieron de la pavimo.

La plej malgranda fraŭlino min rigardis. La frostabscesoj de miaj oreloj ekjukis.

Mia piedo glitis sur la trotuara glacio, kaj ŝi ridis. Ili estas cigaristinoj, mi pensis. Oni rememoru, ke mi estas sufiĉe lerta psikologo.

Mi rigardis mian amikon apud mi irantan. Li rigardis ilin kaj eble pro siaj larmoj li vidis kvar, ses aŭ ok brunajn kaj gajajn fraŭlinojn, sed li sopiris: Kiel malfeliĉega mi estas!

Mi komprenis, ke mi ankaŭ devis konsideri min malfeliĉega. La amikeco kunportas plenumotajn devojn.

La piedoj de la etulo de l'melonforma ĉapelo glitis, liaj manoj eliris el la surtutaj poŝoj kaj faris rapidajn movojn akompanatajn de la respondaj brakmovoj. Iu ordinara menso pensus pri tio, ke ĝi estis danco, sed mi, kiu estas psikologo tuj komprenis, ke tio estis por gardi la ekvilibron. Tre ofte la homo nevolonte ridindigas.

La fraŭlinoj ridis. Mi ridetis kaj la okuloj de mia amiko sekigis.

Finfine la dikuleto falis teren. Lia melonĉapelo libere ruliĝis. Ambaŭ cigaristinoj ridegis. La plej malgranda diris al sia kunulino: Manĝo, estingu la lumon, ĉar la sinjoro jam enlitiĝis. Mia amiko ridegis kaj mi psikologe pensis: Kia strangajo estas la homo!

JOZEFO ORÓS.

**Kursoj en Frateco**

La 15-an de la nuna monato komenciĝis novaj kursoj en nia Societo laŭ la jena aranĝo:

Elementa kurso gvidata de Sro Artigas.

Mezgrada kurso gvidata de Sro Gascón.

Supera kurso gvidata de Sro Salas.

Perletera kurso gvidata de Sro Orós.

Krom tio ĉi en la supera kurso, kiel praktika ekzercado de la lingvo, la profesoro gvidos elementan kurseton de matematiko kaj fiziko ekskluzive en Esperanto.

**Opinioj pri «Sango kaj Sablo»**

El Svenska Esperanto-Tidningen.

*Sango Kaj Sablo.*—De Vicente Blasco Ibáñez. El la hispana tradukis Ramon de Salas Bonal. Eld. Aragona Esperanto-Federacio. 231 paĝoj. Havebla ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm I.

Siatempe tiu libro en sveda traduko estis granda sukceso en la sveda libra merkato, kaj same ankaŭ estis en aliaj landoj. Oni devas gratuli al niaj hispanaj samideanoj pro ilia brava entrepreno eldoni la ampleksan libron en Esperanto. Kaj ĝia arte bela eksterajo, ĝia neriproĉinda preso kaj bindo allogas al lego, kaj mi povas aserti ke tiu, kiu post tia konstato aĉetas la libron, ne pentos, li kun ĝojo legas ĝin de la unua paĝo ĝis la plej fina. Ne estas nura romano, kaj tre interesa tia, estas ankaŭ vera priskribo de tipaj hispanaj moroj por ni nordlandanoj tre fremdaj. Kun ĝuo oni sekvas la travivaĵojn de la toreadoro Johano Gallardo ĉarme enkadrigitajn de ĉio interesa rilate al specialaj naciaj moroj. Entute: la lingvo estas bonega, la "intrigo" la plej interesa kaj la libro inda je vasta legado. Se oni volus kritiki, tio rilatu la emon de la tradukinto konsekvence forlasi la pronomajn formojn.

BEN.

## GRUPO ESPERANTISTA VALENCIA

*Peto.*—Ni deziras ricevi Esp.lingvajn afiŝojn, broŝurojn, turismajn prospektojn, reklamfoliojn, bildkartojn aŭ kovertojn kun maloftaj poŝtmarkoj, k. t. p.

Ĉio aperos en nia konstanta ekspozicio kaj en proksima Internacia Specimena Foiro de Valencia (Majo 1936)—Respondo garantiata. Adreso: Grupo Esperantista. Bibliotekisto. Sangre 9. Valencia (Hispanujo).

## P E T O

Kun la celo koni la opiniojn de niaj legantoj por atingi kiel eble plej grandan allogon kaj intereson en ĉi tiu societa bulteno, en la kadro de nia modesteco, ni petas la legantojn, ke ili bonvolu sciigi al ni siajn preferojn kaj ŝatojn pri la diversaj rubrikaj aperantaj aŭ aperontaj en ĝi, kaj samtempe oni invitas ilin sendi artikolojn, se eble ilustritajn, ne forgesante la koncernajn kliŝojn en tiu lasta okazo.

## « N I A G A Z E T O »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografajoj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiumonata gazeto estas "Aragona Esperanto-Federacio" — strato Roda 10, Zaragoza—, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 6'45 pesetoj, sendokos-to enkalkulita.

## NOVA LERNOLIBRO

Ni ricevis ekzempleron de "Ilustrita Lernolibro de Esperanto por Praktika Komenco" DAKTA verkita de Sro. Delfi Dalnau, profesoro de lingvoj. Prezo: 1'50 pesetoj. Mendebila ĉe Sro. Dalnau, leterkesto 5081—Barcelona.

La celo kaj instrumentado estas sufiĉe klarigata de la jenaj paragrafoj por la profesoroj:

"Ĉiuj vortaroj kaj gramatikoj de vivanta lingvo estas verkitaj kaj studataj post aŭ sur la lingvo, kaj tute ne antaŭe! Esperanto estas hodiaŭ vivanta lingvo. Oni devas lerni kaj lernigi ĝin, unue, praktike, kiel la gepatroj lernigas la infanojn paroli, kiel la infanoj lernas paroli hejme.

Post la baza kaj vivanta parolata lingvo, venu la gramatiko kaj la vortaristo; sed unue la vivo kaj poste la filozofio".

Do la lernolibro estas esence praktika kaj enkondukas rekte en la lingvan scion, pretigante tiel la lernantojn, por ke ili facile povu lerni poste regulojn en ordinara gramatiko.

Ni konsideras tiun ĉi libreton tre taŭga kaj utila tiucele kaj rekomendas ĝin al la profesoroj de komenco kurso.

## Fratega Esperantista Movado

Ni ricevis la unuan numeron de "Fratega Esperantista Movado", bulteno de la samnoma, tutmonda asocio, kies celo estas interfratigi ĉiujn esperantistojn de ĉiuj landoj, klopodante al ilia anima kuniĝado laŭ la interna ideo jam de la unua momento varme prikantita de Zamenhof. Ĉi tiu idealo estas des pli rekomendinda kaj necesa, ju pli la nuna tempo estas tiel plenplena je ĉiuspecaj malamikoj kaj batalemoj.

Aliĝoj al: F. E. M. 4 rue Lamandé—Paris (17<sup>e</sup>).

## A N E K D O T O J

Kiam Viktoro Hugo publikigis sian belegan verkon "Les Misérables" li estis tute senpacienca kaj plej ekscite atendis la unuajn sciigojn pri la publikakcepto de sia produktaĵo. Oni rakontas, ke ne provante plu sin deteni, kelkajn tagojn post la eliro de la verko, sin turnis al la eldonisto kun telegramo enhavanta nur tiun ĉi lakonikan tekston: "La eldonisto bone komprenis la intencon kaj deziron de la eminenta verkisto kaj penante imiti lian senvortan demandon respondis tuj telegrafe:

\* \* \*

Dum vojaĝado en Svisujo, Horacio Vernet sin amuzis unu tagon farante rapidajn skizetojn sur la Geneva lagbordo. Junaj anglinoj ankaŭ desegnigis je kelkaj paŝoj de la loko, kie li staris. Unu el ili alproksimiĝas, rigardas kion li faras, kaj kuraĝige komencas doni al li konsilojn. La maljuna artisto aŭskultas ŝin plej serioze kaj dankas ŝin kun perfekta ĝentileco. La morgaŭan tagon li marveturas Lausanne-on kaj retrovas la antaŭtagan profesoron, kiu alkuras al li dirante:

"Sinjoro, ĉar vi estas franco, vi kredeble konas Horacion Vernet: oni pretendas, ke li staras sur tiu ĉi ŝipeto: estu, do, sufiĉe afabla lin montri al mi.—Ĉu vi multe deziras lin vidi?—Ho, jes.—Nu, fraŭlino, li estas tiu, kiu hieraŭ matene havis la honoron ricevi de vi instruon".

Oni senpene divenas la embarasiĝon de la malfeliĉeta junulino aŭdanta tiujn vortojn.

(Amédée Durande, Korespondado kaj biografio de Vernet).

\* \* \*

Oni parolis pri S-rino de Blot, kiu regas kaj trozorgas la vestmodojn.

"La virinoj ordinare sin vestas, kiel la antaŭan tagon—diris la princino—sed sinjorino de Blot sin vestas ĉiam, kiel la venontan tagon".

(Baronne d'Oberkirch, Memorskriboj).

\* \* \*

Baour Lormian estis tradukinta *Jerusalemo liberigita*. Liaj akademijaj kolegoj ne povis ne ekrideti, kiam li diris naive al ili:

"Nun, kiam mi finis la tradukon kaj jam havas nenion por fari, mi tuj lernos la italan lingvon".

(S-rino Ancelot, Pariza salono).